nia voĉo

madrida esperanto-liceo februaro 2012

## GENERALA KUNSIDO DE MEL

Lunde, la 23an de januaro, je la 18:30, okazis en la sidejo de HEF de la strato Rodríguez San Pedro 13, 3-7, la nunjara Ĝenerala Kunsido de Madrida Esperanto-Liceo. Partoprenis 10 anoj (9 ĉeestantaj kaj unu plia reprezentita).

La protokolo estas sendata al la individuaj anoj, laŭ la ĝenerala kutimo, sed jen baza resumo:

- Informado pri anoj: Je la fino de pasinta jaro, Liceo havis 33 membrojn. Estas substrekinde ke, sekve de pasintaj alvokoj, jam en la unuaj tri semajnoj de 2012, aldoniĝis tri novaj anoj.
- Ekonomia bilanco de la jaro 2011 kaj buĝeto por 2012: La kontoj de 2011, antaŭe senditaj al la membroj, estis unuanime aprobitaj. Oni konstatis ke, bonŝance, la ekonomia stato de la asocio estas bona, kaj restas bazo por entrepreni novajn agadojn. Oni aprobis altigi la antaŭviditajn en- kaj el-spezojn rilate al la sendita buĝeto, kalkulante eblajn subvenciojn unuflanke, kaj partoprenojn en foiroj aliflanke. La jara kotizo, 12 eŭroj, restas senŝanĝa.
- Programo de aktivaĵoj por 2012: Krom la jam senditaj proponoj, elstarindas jenaj proponoj:

  Ni studis kaj debatis eventualan partoprenon en la Librofoiro de Madrido, kalkulante kun la kunlaboro de aliaj asocioj. Ne estas certe ke nia asocio plenumas ĉiujn kondiĉojn postulatajn de la organizantoj, kaj oni konstatas la malfacilaĵojn de la entrepreno, sed oni konkludas ke ja eblas ĝin realigi, kaj do oni faros la unuajn paŝojn por tiu celo.

  Oni organizos serion da agadoj por festi la 50-an datrevenon de la grupo, inter kiuj estas planata publika prezentado en kultura centro fine de septembro ĉi-jare.

  Oni kreos logoon por nia asocio, ĉu pere de dizajnisto, ĉu kunvokante konkurson inter anoj kaj simpatiantoj.
- Aliaj proponoj: Oni proponas krei retforumon por informado kaj debatado perreta, unuigantan jam ekzistantajn retlistojn; la estraro esploros teĥnikajn eblecojn. Estos atentataj la registrado de informoj pri membroj kaj eksmembroj, akorde kun la leĝaro pri datumprotektado.

Ni memorigas ke eblas aliĝi al Liceo per sendo de mesaĝo al la koncerna retadreso, kaj ke la jaran kotizon eblas pagi kontante aŭ al la konto 0081-7110-98-0001266730, ĉe Banco Sabadell.

## NOVA RETA FORUMO

Post la kunveno, jam estis kreata la esperanta retforumo, momente kiel eksperimento ĉe:

http://esperanto.creatuforo.com/

Estas necese unuafoje aliĝi al tiu forumo, kiu krome estas tute senpaga. Poste, ĉiufoje kiam oni volos aliri tien, oni devos skribi kaj sian identigilon kaj sian ŝlosilvorton. Enirinte la forumon, estas videbla sur la ĉefa forum-indekso iu strukturo. Tiu organizmaniero estas facile modifebla por ĝin alĝustigi al niaj bezonoj kaj plaĉoj.

## VIZITO AL MADRIDAJ CENTRAJ KVARTALOJ

La 21-an de januaro, matene, okazis, kiel planite kaj anoncite (kvankam kun eraro en nia antaŭa *Nia Voĉo*, pro kio ni petas senkulpigon), vizito al kvartaloj Santiago kaj San Ginés, en la centro de Madrido. Temis pri la areo inter la stratoj Mayor, Arenal, Bailén kaj Puerta del Sol.

Partoprenis deko da homoj, kaj la vizito daŭris pli malpli du horojn. La partoprenantoj ĝuis multajn klarigojn, interesaĵojn, anekdotojn, legendojn, historiajn eventojn pri preskaŭ ĉiu strato kaj grava konstruaĵo de la kvartalo, rakontitajn de Pedro Hernández.

Pedro anoncis ke li klopodos organizi por la venontaj monatoj novajn intensajn vizitojn en konkretaj kvartaletoj de la Centro (Sacramento, San Andrés, Puerta Cerrada, Plaza Mayor, Vistillas...), kaj invitas ĉiujn partopreni la venontajn vizitojn, kiujn ni sinsekve anoncos tie ĉi.

## KANALO DE MEL EN JUTUBO

Dua filmeto aldoniĝis al la kanalo de MEL en la videa spaco Jutubo (Youtube). Temas pri alia registraĵo de la Zamenhofa Tago 2011, en kiu Miguel Fernández deklamas kaj poste kantas sian poemon "El nia nio inta" kun gitar-akompano de Laura Carballo laŭ originala melodio de Pedro Vilarroig. La adreso estas: http://www.youtube.com/watch?v=TTJs9Z7KEeg.

La ĝenerala adreso de la kanalo estas: http://www.youtube.com/user/madridaliceo.

## ALVOKO PRI LA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

Kiel oni jam scias, venonta HEF-Kongreso okazos en Almagro (Ciudad Real) de la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo. Unu el la identigaj trajtoj de tiu urbo estas la teatro. Sekve, la organizantoj komencis studi la eblon priomaĝi teatron kongres-kadre. Nun la LKK faras tian klopodon ĉe kelkaj E-teatristoj por definitivigi ies partoprenon. Sed krome, nia kunmembro Miguel Fernández sendis alvokon per diversaj listoj kaj forumoj por speciala aktivaĵo dum tiu renkonto:

> «Mi ŝatus aranĝi ion malpli profesiecan, pli multope kunrolatan de komunaj e-istoj, pli festan... Nia diseco ne permesus al ni munti formalan teatraĵon, sed eblus, ke ĉiu el la interesatoj en persona omaĝo al la teatro preparu mem ne longan poemon (preferinde el E-poeto) aŭ etan monologon (preferinde el la propra kapo) aŭ humuraĵon... por voĉlegi aŭ reciti. Aŭ kanton. Aŭ... ion ajn spektindan kaj dignan. Tiel ni kreus komunan spektaklon, kiu povus amuzi la rolantojn kaj, verŝajne, eĉ la spektantojn. Ni kalkulas je la partopreno de Laura Pascual, juna madrida aktorino, kiu, kvankam nur antaŭ kelke da monatoj komencis lerni esperanton, kuraĝos enkapigi al si tekstojn el Federico García Lorca en traduko miapluma por enscenigi draman pecon kiel kulminon de nia komuna prezentado.
>
> Do ĉiu kongresonto ema kontribui al tia spektaklo estas petata rete min kontakti por sciigi min pri siaj projektoj. La homoj, kiuj deziras elekti mem tekston aŭ verki propran kreaĵon por voĉlegi aŭ reciti, bonvolu sendi ilin al mi por ke mi kontrolu ilian daŭron, ordigu ilin laŭ temoj, ellaboru rakontan fadenon, ĉirkaŭ kiu disvolviĝos la tuta prezentado, kaj pretigu fonmuzikon laŭeble konforman kun la elektitaj enhavoj. Mi mem povas sendi tekstojn al la homoj, kiuj ne deziras elekti aŭ verki mem. Se iu deziras ludi muzikilon aŭ prestidigiti... aŭ prezenti ion senparolan, bonvolu informi min pri la konsisto kaj pri la daŭro.
>
> Ek do al la spektaklo, gekompanoj!»

Mesaĝon al Miguel Fernández vi povas sendi pere de la adreso de "Nia Voĉo".

## VIZITO AL TOLEDO

Nia kolego Pablo Busto, kiu gvidas kurson de Esperanto en Toledo, faris alvokon al ĉiu interesiĝanto partopreni amikan kunvenon en la urbo, la venontan 11-an de februaro, koincide kun la fino de la kurso. Oni promenos tra la centraj kvartaloj de la urbo, montrante ĝin, kaj poste oni komune manĝos, eble en vegetarana restoracio. Pluraj madridaj amikoj jam anoncis sian pretecon partopreni la renkonton.

## MADRIDA PROGRAMO

La kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la grupo. Krome la 4-an de februaro, sabate, je la 5-a, okazos babilrondo en kafejo 4D, kun speciala atento al la novaj lernantoj de la progresiga kurso.

La kursoj gvidataj de Pedro Hernández daŭras ĉiusabate matene, de la 11-a horo. Vizitu http://www.facebook.com/cursosdeesperantoenmadrid.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com